E Ŭ R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 20
9-an de junio 2002

Redaktas:
Umberto Broccatelli -
Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio
Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio
u.broccatelli@tiscalinet.it
-u.broccatelli@libero.it
tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:
Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@wxs.nl
UEA-konto de EEU: ***eece-p***

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio* (**EEU-informilo**) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).
Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@tiscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo"
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante "simpatianto de EEU", per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 eŭroj jare al la UEA-konto **eece-p**
TTT-ejo de EEU: **http://lingvo.org/eo.html**

E E U - I N F O R M I L O

LETERO AL LA LANDAJ ASOCIOJ

La Prezidanto de EEU sendis leteron al la prezidantoj de la 15 landaj Esperanto-asocioj en Eŭropa Unio. La leteroj estis senditaj kiel prioritata poŝto al la adresoj de la asocioj aperantaj en la UEA-jarlibro 2001, escepte de la prezidantoj de la asocioj brita kaj belga, al kiuj ĝi estis sendita al la persona adreso.

Jen estas la teksto de la letero.

PRI LA BRUSELA KOMUNIKADCENTRO

Al la estraroj de la landaj asocioj en Eŭropa Unio.

ENKONDUKO
La Landaj Asocioj kunlaborantaj en Eŭropa Esperanto-Unio konstatas ke dum longa periodo la aktiveco de la Unio estis limigita al la subteno de la laborgrupo pri lingvaj problemoj sub gvido de Hans Erasmus.
La kunordigo de la informado ĉe la instancoj de Eŭropa Unio kaj diversaj novaj iniciatoj por la agado ĉe parlamentanoj kaj la gazetaro lamis depost la ĉesigo de la Brusela oficejo fine de la okdekaj jaroj. La parlamenta agado estis transprenita de G. Pirlot, nun denove pere de EEU.
Multaj inter ni bedaŭris tiun situacion, kaj novaj esperoj naskiĝis kiam en Bruselo A. Mertens Goossens disponigis senpage du etaĝojn de granda domo en la urba centro por Esperanto-agado. Lia celo estis koncentrado de diversaj naciaj kaj internaciaj aktivecoj en Bruselo pro la grandaj avantaĝoj rilate al kontaktoj kun la multegaj ĵurnalistoj kaj NRO-j en tiu urbo. La teamo Mertens-Maertens, la kunlaboro flanke de la Brusela Esperanto-grupo sub gvidado de Angelos Tsirimokos kaj la eblecoj por EEU ebligis finfine lukontrakton inter Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj la domposedanto, kiu ne kostis al BEF kaj helpus al malplialtigo de la domaj impostoj. Tiel la financa perdo por la domposedanto iomete malgrandiĝus. La malfermo de la Brusela Esperanto-Centro okazis solene kaj estis samtempe gazetara konferenco kun sekve multe da pozitivaj reagoj en la gazetaro. Tamen en tiu momento ni nur dum mallonga tempo trovis personon kiu volis loĝi en la domo kaj samtempe

kunordigi la diversajn aktivecojn. Post lia foriro la du etaĝoj ne plu utilis samgrade kaj estis forluitaj kiel apartamento.
Neniu kunlaboranto forgesis la entuziasmon de la protagonistoj kaj la pretecon de A. Mertens por sukcesigi la tuton pere de intensa laboro kaj grandaj financaj investoj.
Tamen EEU, Belga Esperanto Federacio, la Brusela Esperanto-grupo kaj ĉiuj entuziasmaj iniciatintoj estis primokitaj en kovrilpaĝa artikolo de Heroldo de la 10 11 2000 sub la titolo Bruselo, ho kara...

LA LABORPLANO DE UEA KAJ LA NOVAJ INSTRUKCIOJ POR LA INFORMADO
Dum la perretaj diskutoj pri la kunmeto de nova laborplano por UEA, poste akceptita en la UK en Zagrebo, konstateblis la neceso de profesiiĝo de la informado kaj de la metodoj pri informado. Pro tiaj diskutoj eniris i.a. en la laborplanon la frazo de la rubriko "1-a agadkampo: informado":
"Direkte al profesiiĝo la agadkampo entenas atenton al plikvalitigo de la studado pri internacia komunikado kaj pri la rolo de Esperanto".
Ni jam depost la unua lernolibro rekte informas la publikon pri nia lingvo, sed tiu rekta informado ne estas facila. Fakte por plene konsciiĝi pri la valoro kaj la eblecoj de Esperanto, oni devas lerni ĝin. Ni do devas informi pri varo, kiu parte ne estas konata, eĉ fremda por la eventuala interesato.
Ekzistas tamen kampoj, kies prilaborado kongruas kun nia tuta komunumo. Ni ĉiuj estas multe pli atentaj pri lingva diskriminado kaj suspektemaj pri lingva imperiismo. Lingva egaleco estas natura produkto de nia komunumo. Fakte ni estas vole-nevole pioniroj de la lingva demokratio. Nia komunumo eĉ rimarkas kaj pristudas la soci-ekonomiajn kaj kulturajn sekvojn de altrudo de nacia lingvo por internacia uzado. Ni ja sekvas la travivaĵojn de multaj minoritataj lingvoj kiuj jam spertis tiujn sekvojn.

KONKRETE
Por ke nia komunumo trovu aliron al la tutmondaj komunikiloj per regula prezento de profesiforma informado pri lingvaj problemoj en la mondo nia movado devus disponi pri centro establita en taŭga loko kie oficas profesia ĵurnalisto kiu kutimas labori en internaciaj medioj.

Tiuj premisoj por la instalado de tia centro ekzistas en Bruselo:
1. multaj internaciaj organizaĵoj kaj NRO-j laboras tie;
2. en la Eŭropa Unio ne mankas lingvaj problemoj;
3. tre multaj ĵurnalistoj el la tuta mondo deĵoras en Bruselo;
4. internacia Esperanto-grupo kun funkciuloj el la Eŭropa Komisiono aktivas en Bruselo (Prezidanto estas Angelos Tsirimokos, kunlaborantoj, Michael Cwik, de Souza ktp.); ankaŭ Marko Lins loĝas en Bruselo;
5. Bruselo proksimas al la CO, al la Antverpena Esperanto-Centro kaj al la Parizaj Centroj, kun fortaj Landaj Asocioj en la najbareco (Franca Unuiĝo kaj Germana Esperanto-Federacio);

kaj plej grave, la profesia ĵurnalisto Dafydd Ferguson, kimra specialisto pri la lingva problemo, kiu eklernis Esperanton volis dum iom da tempo labori por tiaspeca centro en Bruselo.

Aliflanke, la tuja dungado de profesia ĵurnalisto preterpasas nunmomente la financajn eblecojn de EEU. Nur se EEU efike laboras ni povas pli facile akiri krom moralan ankaŭ financan helpon.
Tamen decido urĝis pro la diversaj cirkonstancoj en Bruselo. Dungado fare de EEU ne eblus, nur UEA povis helpi por adekvate solvi tiun problemon.

PROCEDURO
La UEA-estraro ricevis en aprilo de 2001 peton de EEU, surbaze de provizora buĝeto, por garantii financajn rimedojn por EEU ĝis 25000 eŭroj por 2002 kaj 2003. Tiuj du jaroj devis ebligi al EEU mem trovi la necesajn rimedojn pere de la LA, donacoj de membroj kaj oficiala subteno de iuj instancoj.
La tiama estraro, sojle al reelektoj en Zagrebo, konsideris la eventualan decidon tro grava por haste formuli ĝin, sendis la peton al la financa komisiono kaj al la komitato. En Zagrebo tri gvidaj instancoj i.a. la komitato petis al la nova estraro pozitive konsideri la peton. Ni volas danki la komitatanojn kaj estraranoj de UEA kiuj subtenis tiujn rezoluciojn.
Sekve al tiuj insistaj rezolucioj kaj pro demisioj kaj reorganizado de la CO la estraro decidis akcepti la financan respondecon, sed samtempe petis povi uzi la centron por dissendo de propraj sciigoj. Pro tiu starpunkto de UEA, la dungado en Bruselo celis parte al pligrandigo kaj profesiigo de la agado de UEA sur la informa kampo, kadre de la nova laborplano. Pro la komenciĝanta jaro 2002, la dungado ne plu povus esti kontraktita antaŭ marto, kaj Dafydd Ferguson proponis agi senpage dum unu monato (marto). Tial la provizora buĝeto jam malaltiĝis ĝis 19000 eŭroj koncerne la garantiotan sumon flanke de UEA.

Ankaŭ la luo de ejo ne ankoraŭ okazis, do malpli da kostoj.

Por faciligi la jurajn kaj sociajn aspektojn (EEU ne ankoraŭ disponas pri propra jura identeco), Flandra Esperanto-Ligo (FEL), kiu jam havas spertojn pri dungado kaj eventualaj subtenoj por kulturaj aktivecoj en Belgio, faris la kontrakton kun Dafydd Ferguson kaj EEU devas nun kontrakti kun FEL pri la financado kaj pri iuj oficejaj laboroj farotaj de FEL en Antverpeno. EEU forigas do la administrajn laborojn al FEL kontraŭ fakturado.
Eventuala lu-kontrakto por oficejo okazos sammaniere inter Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj EEU.
Tio lasas al ni la tempon por starigi internacian asocion kun jura identeco rekonitan de la Belga ŝtato.

NUNA TASKARO
La nuna tasko konsistas ĉefe en la atentigo per ĉiuj rimedoj, nome de EEU, eventuale nome de UEA, pri lingva diskriminado kaj lingva imperiismo en Eŭropo kaj ekster Eŭropo, kaj krome en starigo de retdomajno.
Per tia profesie organizita agado ni klopodas malfermi la komunikadon inter la instancoj, la ĵurnalistoj kaj la NROj.
Se ni povos krei seriozan kaj profesion etoson pere de tiu Esperanto-centro, ni povos eventuale ŝanĝi la sintenon de multaj funkciuloj kaj ĵurnalistoj rilate al nia lingvo. Ili nun tro rapide fermas la pordon pro antaŭaj spertoj pri leterkanonoj, tro postulemaj petoj kaj projektoj, neadekvataj rezoluciproponoj, amatorecaj intervenoj ĉe funkciuloj kaj politikistoj. Memoru ke la Brusela Laborgrupo sub gvidado de Hans Erasmus pro la samaj kialoj devis agadi sub la ĝenerala titolo de lingvaj problemoj en EU, sen afiŝi Esperanton.
La centro jam disponas pri 4000 retpoŝtaj adresoj de politikistoj kaj ĵurnalistoj. Ni do jam povas rekte atingi ilin laŭ bezono, depende de la novaĵoj.
Jam estis fruktedonaj kontaktoj kun tradukistoj kaj tradukantoj, kaj kun landaj gazetaraj servoj, cele al adekvata agado de tiuj servoj en kunlaboro kun la centro (Belgio kaj Italio).
Intertempe ni organizas la formalaĵojn pri la starigo kaj la dungado kaj klopodas trovi staĝiston por helpi kaj eventuale anstataŭi la nunan dungiton.
Raportado al la LA kompreneble ankaŭ tre gravas.

ESTONTA TASKARO
Por akiri la profesian nivelon, la centro ne ankoraŭ organizas informajn kampanjojn; la eventuala rekta informado okazas nome de UEA. EEU ĉefe agas pere de Esperanto por atentigi pri diskriminadoj en la kadro de lingva demokratio. Kompreneble la centro jam respondas al informaj petoj pri Esperanto.
Post la akiro de profesieco kaj seriozeco, la centro ankaŭ ekagos kiel informejo pri Esperanto.
Cetere ĝi klopodos esti la kupolo por kunlaborado inter la diversaj Esperanto-instancoj kiuj agadas en Bruselo.
Tial EEU ne ankoraŭ fiksis la oficialan titolon de la centro por ekstera agado diversflanka. BKC estas provizora interna nomŝildo. Ni devas kunlabori kun la laborgrupo de Bruselo (Erasmus kaj Cwik), aparte grava pro la ĝenerala agado pri la lingva problemo en Eŭropo, sen la Esperanto-ŝildo. Ni devas disponi pri la ebleco kunlabori kun la asocioj kiuj interesiĝas pri minoritataj lingvoj. Ni devas krei kunlaboran etoson kun la Brusela grupo, kun TEJO, kun SAT, kun Parizaj Esperanto-instancoj. La listo de eblecoj ne estas kompleta.

Financado
La efikeco de la BKC dependas parte de la financaj eblecoj, kiun EEU devas kiel eble plej rapide akiri el diversaj fontoj. Tro facile estus forŝovi la financan respondecon al UEA. EEU devas esti fidinda partnero por UEA.
Jam kelkaj reagoj:
Esperanto Nederland decidis pri plialtigo de la landa kontribuo ĝis unu eŭroj por ĉiu membro de la LA en 2002, fidante ke ankaŭ aliaj LA sekvos. EEU priparolos tion dum la Verona kongreso ĉi-jare.Esperanto Nederland aldonis ke ĝi garantias la sumon de 2000 eŭroj por la jaroj 2002 kaj 2003, por kovri eventualan deficiton de la BKC.
Esperanto France decidis jam en april 2001 subvencii BKC per 2500 Fr.F. La Brusela grupo disponigis 5000 eŭroj, laŭ sugesto de Dafydd Ferguson, por la kostoj de staĝisto.

EEU esperas ke la LA kiu disponas pri iuj financaj rimedoj decidos kiel eble plej baldaŭ subteni la centron, egale sub kia formo. Nepre ni atendas la ra pidan enpagon de ma minimuma kontribuo, egale al duona EŬR po enlanda membro.

Buĝeto 2002 en Eŭroj

ENSPEZOJ

10.000 el EEU-fontoj
3.200 el aliaj fontoj, ekz. de Inst.Hodler '68

	3.800 pro specifaj donacoj	
Totalo de la enspezoj		17.000

ELSPEZOJ

27.000 por dungado dum 9 monatoj, asekuroj kaj impostoj enkalkulitaj	
3.800 por luo de ejo	
4.000 por diversaj elspezoj kaj administraj laboroj fakturotaj de FEL	
1.200 por ekipaĵoj de la ejo	
Totalo de la elspezo	36.000

Deficito 19.000, eventuale pagotaj de UEA.
Se la deficito estus pli granda, tiam Esperanto Nederland intervenas por maksimume 2000 eŭroj.
Sed la ĝisnuna kalkuloj montriĝas pli favoraj; la postuloj de Dafydd Ferguson estis pli malaltaj aŭ buĝetitaj, ne ankoraŭ ekzistas lukontrakto, provizore ne ekestas administraj kostoj. Por la nebuĝetitaj kostoj por staĝisto ni disponas pri rezervo de la Brusela Grupo.

La nura necerta sumo por la estonteco, do por 2003 jam troviĝas tuj ĉe la komenco, la spezoj de EEŬ mem. La cifero de 10.000 eŭroj por 2002 enhavas la rezervon de 2000 kaj de 2001 Jare ni dum la lasta tempo kolektas nur 2250 eŭrojn, sed la plimulta de la LA sur la teritorio de la Eŭropa Unio ne grave kontribuis, aŭ tute ne kontribuis, kaj, se ni volas la sukceson de BKC, almenaŭ por 2003 kaj 2004 la LA devus kontribui pli ol antaŭe.

Respondeca komisiono por la Komunikadcentro en Bruselo (KBK)

Tri Komisionanoj de EEU

Dafydd Ferguson
Claude Longue-Epée
Grégoire Maertens

Tri Komisionanoj de UEA
Ans Bakker
Marko Naoki Lins
Ivo Osibov

Unu komisionano de Belga Esperanto-Federacio
Flory Witdoeckt

Unu komisionano de Institucio Hodler '68
A. Mertens Goossens

Pro Ofico
La Ĝenerala Direktoro de UEA, nuntempe, Trevor Steel
La trezoristo de EEU, nuntempe Hans ten Hagen

Entute dek personoj kiuj estas facile kontakteblaj rete. Kunveno estas planita en Bruselo por septembro kun aliaj interesitoj.

KONKLUDO

BKC, per tute nova formo de informado, klopodas plialtigi la prestiĝon de nia lingvo ĉe oficialaj instancoj en Bruselo kaj tutmonde ĉe la ĵurnalistoj. Evoluo al kupola centro kaj al la informa centro de UEA estas niaj celoj en la baldaŭa estonteco.
Tiuj celoj sonas bele, se nur parto realiĝas, ni jam sukcesus. Pri la grandeco de tiu parto decidas ankaŭ vi.

Do ni alvokas al ĉiuj landaj asocioj en Eŭropo, ke ili informu siajn anojn pri la iniciato de EEU.
Ni alvokas al ĉiuj esperantistoj, por ke ili malavare subtenu la entreprenon.
La Komunikad-Centro komencas sian vojon per la helpo de UEA, sed ĝi povos pluiri kaj atingi rezultojn, nur se ĝi sukcesos akiri sufiĉan memstarecon.

Enpagi eblas per konto eece-p ĉe UEA kaj la sama konto ĉe FEL (Antverpeno).

Anticipan dankon.

Umberto Broccatelli, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

P.S. - Tiu ĉi letero estas verkita surbaze de teksto de Grégoire Maertens, kiun mi kore dankas pro la kunlaboro. (U.Br.)

* * *

EŬROPA DEBATO

Memorante kaj esperante.

"Eŭropa Konvencio" estas starigita por pristudi kaj proponi la reformojn necesajn al la disvolviĝo kaj al la plilarĝiĝo de Eŭropa Unio. Membroj de la eŭropa parlamento, de la naciaj parlamentoj kaj de la naciaj registaroj devas produkti projekton, kiu estu submetata al la posta Verto-kunveno de la Konsilio de la Ministroj de EU.

Al ili oni devus memorigi la penson de Jean Monnet, unua prezidanto de la Alta Aŭtoritato de la Eŭropa Komunumo de Karbo kaj Ŝtalo (CECA) kaj inspirinto de la substanco de la Schuman-deklaro de la 9a de majo 1950, el kiu naskiĝis CECA. Li diris: *Eŭropo ne fariĝos en unu tago, sed laŭ sinsekvaj etapoj*; la ideo pri la sinsekvaj etapoj estis ja konstantaĵo de lia metodo, sed eble de la Monnet'a analizo oni ne sufiĉe prilumis unu aspekton: t.e. la klara alvido al la lasta celo, al kiu tiu strategio devis konduki.

Li diris interalie, ĉe la naskiĝo de CECA: *Al ni certas tio, ke el tiu ĉi nuna revolucio, demokratia kaj paca, komencita en nia kontinento, naskiĝos la Unuigitaj Statoj de Eŭropo. La suverenaj povoj, kiuj estis delegitaj al la komunaj institucioj, estas plenumataj de organismoj, kiuj estas la unuaj federaciaj organismoj de Eŭropo.>>*

La kunveno de eminentuloj, kiuj devas proponi la reformojn de EU, nomas sin "konvencio". Estas esperinde ke tiuj homoj memoros pri alia konvencio, tiu de Filadelfio, el kiu naskiĝis la Konstitucio de la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko.